



Eventoj

Redakcia adreso:
Budapest, pk. 87.
H-1675, Hungario
Telefono kaj telefakso:
(+36-1) 1288-258

Internacia Sendependa Revuo pri la Esperanto-Movado

marto (2) - '92

La miskompreno de la episkopo

Fine de la jaro 1989 ni ĉiuj admiris lin, heroon de la revoluciaj eventoj en Rumanio. La hungara episkopo László Tőkés fariĝis viva legendo. Homamasoj sekvis, sekvas lin, lian modelan konduton.

Post la mondpolitikaj eventoj li ne ripozas sur siaj laŭroj. Li ĉeestas ĉie, kie li povas fari ion por la nacia repaciĝo.

Sekve de televida deklaro rilate al "utopieca esperantismo" malgraŭ sia okupiteco respondis nian nefermitan leteron.

Por kompreni la respondon, unue sekvu la nefermita letero mem, aperinta en *Hírharsona* (hungarlingva suplemento de revuo *Debrecena Bulteno*, organo de Esperanto-Asocio de Debrecen kaj Ĝia Regiono).

al László Tőkés
episkopo de la kalvinana diskrikto
ĉe la regiono Kírdályhágó/Pasul Craiului
Sinjoro Episkopo!

Kiel multegaj spektantoj de la televida programo *Panoráma* de la Hungara Televido, kun estima atento mi sekvis deklarojn de via Episkopa Moŝto. Kun alta ekscitiĝo ni atentis tiun rolon, kiun vi plenumis en la faligo de la Cease-scu-reĝimo. Ni scias ankaŭ, ke ĝisnune vi estis unu el la plej ĉefaj defendantoj de la ĝeneralaj homaj rajtoj en la najbara Rumanio. Dankon pro tio!

Ankaŭ vian deklaron diritan la 15-an de marto 1991 mi aprobas certe kune kun multaj esperantistaj samideanoj, escepte de tio, kion vi diris rilate al esperanto.

Bedaŭrinde la tekston mi ne scias citi konforme precize, sed kion mi komprenis el ĝi, tio estas, ke vi ne kredas la kosmopolitiismon kaj ian esperantan solvon. Kiel ajn nekredinde estas, tion ne kredas ankaŭ la esperantistoj, sed ili kredas tion, ke por la multlingveco-problemoj de la mondo ne ekzistas alia taŭga solvo alternativa. Ni deklaras tion, ke homo konsideranta sin moderna, bezonas du lingvojn, el kiuj la unua estas la gepatra lingvo kaj la dua estas neŭtrala pera lingvo. Rilate al la unua ni certe konsentas. Sian taŭgocon por la dua esperanto pruvis jam antaŭlonge. Ni opinias ne hazarda, ke la funkciadon de la rumaniaj esperanto-organizaĵoj malpermesis ĝuste Ceausescu pelanta "grandrumaniajn" sonĝojn, simile al aliaj diktatoroj de la mondo. Li timis, ke rumanoj kaj hungaroj, sumanoj kaj saksoj k.a. retrovos sin reciproke kaj unu el la plej bonaj rimedoj de tio povas esti ĝuste la neŭtrala esperanto. Ni fidas vortojn de Endre ADY, laŭ kiuj unu el la plej gravaj kondiĉoj de nia nacia konserviĝo estas tio, ke ni ne estu devigataj transpreni por ni frem-

Aperis la Dua Bulteno

Ĝus aperis kaj estis sendita al la aliĝintoj la dua bulteno de la Viena UK.

La bulteno donas la plej gravajn informojn kaj konkretigojn, necesaj por la partoprenontoj. En la kongresa programo estas listigita plano por 29 ekskursoj!

Dokumentoj de la kongreso estas sendataj nur al la partoprenontoj. Aliĝilon kaj la Unuan Bultenon (kun la adresoj de landaj kotizperantoj) petu de via landa asocio, aŭ rekte de UEA: NL-3015 BJ Rotterdam, Nieuwe Binnenweg 176, Nederlando.

Esperantistoj el netranspagipovaj landoj kaj gejunuloj ĝis 26-jaraj el ĉiu lando aliĝilon al la oficiala antaŭkongreso en Prago petu rekte ĉe ĈEA: ul. Jiřka 10, Prago 1, CS-110-01, Ĉeĥo-Slovakio.



dajn lingvojn germanajn, slavajn aŭ latinidajn, kaj kune kun ili tiajn kulturojn. Nian identecon ni povas rezervi nur helpe de la internacia lingvo, alie ni dissolvigis en maro de zonantaj popoloj. Sed la saman intereson havas ankaŭ la aliaj malgrandaj popoloj en la Karpat-baseno. Pro tio ni havas multe da amikoj inter slovakaj kaj ĉefaj, rumaniaj kaj germanaj, kroataj kaj serbaj esperantistoj. Ni estas certe pri tio, ke en la advento de la jaro 1989 en Temesvár/Timisoara malantaŭ vi enviciĝis ankaŭ la esperantistoj kun rumana lingvo gepatra.

Ni estas devigataj skribi nefermitan leteron, ĉar niaj multegaj leteroj same perdiĝas en la rumana poŝto, kiel sub la antaŭa reĝimo. Ni tre ŝatus esperi, ke via Episkopa Moŝto komprenas niajn noblajn strebojn, kaj vi ankaŭ en Rumanio bezonos la pluan subtenadon de la esperantistoj.

Kun plej alta estimo

d-ro Béla Mészáros
prezidanto, respondeca redaktoro de
Esperanto-Asocio de Debrecen kaj Ĝia Regiono

(La respondon vidu sur p. 2)

Letero el Zagrebo

Elkoran dankon pro la bonaj pensoj, kiujn vi sendas al ni en Zagreb. Dankon, ke vi zorgas pri ni en la militaj cirkonstancoj.

Ĉu ni devas rakonti al vi kio okazas ĉi-tie aŭ ĉu viaj ĵurnaloj, TV kaj radio-elsendoj bone klarigis? Ni naskiĝis en Jugoslavio, la lando kiu fondiĝis en la jaro 1918. Zagreb estas la ĉefa urbo de la respubliko Kroatio. En 1990 la loĝantoj de la respubliko Kroatio voĉdonis pri sendependiĝo de Kroatio el Jugoslavio. Jugoslavio tion ne permesas: jugoslavia armeo kun siaj aliancanoj, komandata en Beograd, armeo atakis multajn kroatajn urbojn, interalie la plej faman – Dubrovnik...

... Kiel nia vivo ŝanĝiĝis! La urbaj keloj estas transformitaj al ŝirmejoj: se ili estas grandaj ni povis enmeti en ilin seĝojn kaj eĉ matracojn por pasigi nokton, se necese. Ŝanĝiĝis ankaŭ nia urbo: ĉe fenestroj de la urbo, kiuj estas plej proksimaj al la tero, kuŝas multaj sablosakoj. Ili protektas la kelojn de eventualaj damaĝoj dum bombardado – ke nenio povu eniri en la subterajn rifuĝejojn, kie ni nun ofte devas eniri...

... En la rifuĝejan sakon ni devas enmeti varmajn vestojn, iom da manĝaĵo, niajn dokumentojn, akvon. Ĉiu aldonas ion laŭ sia plaĉo: skribilon, libron, paperojn... Vi aŭdis, ke Zagreb estis bombardita. Ĝis nun aviadiloj estis super Zagreb pli ol 40 fojojn – sed ne ĉiam ili bombardas. Ĉiam ni estis en la protektejoj kaj zorgoplene aŭskultis la novaĵojn. Zagreb estis bombardita tri fojojn - estis trafita la TV-elsendilo sur la monto apud Zagreb kaj la prezidanta palaco. Dum la bombardado estis forte damaĝitaj 9 domoj, iom damaĝitaj 65 konstruaĵoj. Sed ekster Zagreb estas detruitaj tutaj urboj. Pli ol mil homoj mortis, pli ol dek mil estas vunditaj.

Ĉiam, kiam aŭdiĝas la sireno kaj ni eniras la kelojn, ni demandas nin: ĉu ni eliros? Ĉu ni retrovos niajn domojn nedetruitaj? Ni deziras, ke revenu la paco. Ni ŝatus denove dormi en niaj litoj, kaj ne sur la matracoj en la keloj. Ni ŝatus denove trankvile manĝi supojn el belaj teleroj kaj ne el improvizitaj glaso. Ni ŝatus promeni sur la stratoj kiel aliaj sen la prema aŭskultado: ĉu tiu sono estas alarmsireno?

Ni atendas, ke la paco revenu. Ni ŝatus, ke malamo kaj milito malaperu.

Dankon pro la bonaj pensoj, kiuj atingas nin. Viaj elkoraĵoj pensoj varmigis nin kiel belaj lanaj tukoj.

Spomenka Štimec
laŭ Pacinfano, 1991/3.

Teorio

Proklamo, kiu sintezas

Nek lanĉi novan direkton, nek proklami novan revolucion malkovron, sed resumi tion, kion la plimulto de esperantistoj jam decidis.

La jubilea dudek-kvina konferenco de ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj) akceptis la apudan dokumenton por kontribui al la strategiaj debatoj en la "Movado". Por situi ĝin historie, memoru la Deklaracion de Tireso (Svedio) 1969 kaj la Manifeston de Raŭmo (Finnlando) en 1980. Konferencinte en Norvegio, dudek kaj dek jarojn post tiuj eventoj kaj aliaj dokumentoj, ŝajnis oportune rekonsideri ilin. Nia rezulto nek celas lanĉi novan direkton, nek proklami novan revolucion malkovron, sed resumi tion, kion la plimulto de esperantistoj jam decidis kaj komprenis por si mem, kaj iel sintezi la pretendojn de la antaŭaj dokumentoj kune kun taŭga sinteno por instruistoj.

La proklamo koncize redonas la esencon de la artikolo en IPR 1991/2, kiu disvolvis la rilatan konferencan temon, kaj kiu iom pli adekvate defendas kaj klarigas la asertojn de la proklamo. Ĝia sintezo provas trakti la kontraŭdirojn inter propagandemaj, finvenkemaj kaj kultur-flegemaj esperantistoj, inter desupristoj kaj desubistoj kaj inter esperanto kaj aliaj lingvoj.

(laŭ IPR, 3/91)



Proklamo de Voss (1991)

Esperanto kiel funkcianta lingvo

En la disvastiga laboro, unuarange gravas emfazi, ke esperanto estas jam funkcianta lingvo kun la propraj historio, kulturo kaj kulturportaj valoroj kaj strebi, ke ĝi ĝuu sur plej diversaj kampoj samajn rangon, rajtojn, rimedojn kaj prestiĝon kiel etna lingvo de simila disvastiginteco, kaj krome, ke ĝi estu estimata pro sia unika tutmonda rolo kaj sia potenciala kontribuo al la demokratiigo de la komunikado.

Esperanto kaj strategio

Kerne al la strategia debato estas malharmonio inter desupremaj kaj desubemaj agantoj. Evidentas unuflanke, ke klopodoj devigi la uzon de esperanto desupre al iu nekonvinkita popolo ne nur fiaskos, sed estas kontraŭ la etika bazo de la lingvo. Klaras aliflanke, ke dum desuba laboro konstante necesas, de si mem ĝi malverŝajne kondukos al signifa kresko de la lingvo aŭ ĝia komunumo. Pli saĝa strategio estas la kombino de ambaŭ vojoj per zorge elektitaj projektoj, tiel ke la desube akiritaj decidoj kaj permesoj renkontu desube kreitan deziron aŭ bezonon.

La celo al kvalito estas laŭdinda, sed necesas konstati, ke la kvalito plej ofte fontas el kvanto, kaj tiun kvanton povas krei la instruado, kadre de iu apartan gravecon havas la adekvata kaj laŭeble oficiala trejnado de instruistoj.

Esperanto kaj naciaj lingvoj

Esperanto utilas por protekti la rajton de minoritataj lingvoj; la esperantistoj oponu nenion specifan lingvon, naciaj lingvoj estas respektendaj, sendepende de grandeco. Es-

perantistoj tamen malkontentu pri la uzo de naciaj lingvoj por transnaciaj celoj, precipe kiam tio diskriminacias kontraŭ neparolantojn de tiuj lingvoj kaj minacas la pluvivon de minoritataj lingvoj kaj kulturoj. Vanas batali rekte kontraŭ difinitaj grandaj lingvoj, sed necesas malkonstrui la mitojn kiuj subtenas ilian misuzon, zorgante fari tion per pravigeblaj argumentoj kaj ne per niaj propraj mitoj.

Esperanto kaj ĝia destino

La tradicia termino fina venko kun siaj militecaj subsignifoj transformiĝu al konsanta agado por ebligi la uzon de esperanto inter tiu kreskanta nombro de personoj celantaj transnacion komunikadon. La plukreo de aŭtonoma esperanta kulturo estas valora, necesa, sed ne sufiĉa antaŭkondiĉo por tiu strebo; sekve konflikto inter kultur-flegemaj kaj finvenkemaj esperantistoj estas transportebla ili povas trovi abundajn terenojn, kie utile kunlabori. Signifa kvanta kaj kvalita salto en la uzo de esperanto ne okazos:

– sole per klopodoj de la nunaj parolantoj, kiuj havas nek rimedojn nek la potencon tion solaj realigi;

– sen la klopodoj de la nunaj esperantistoj teni la lingvon evoluanta, la komunumon vivanta, la aplikeblojn vastigantaj, ĝis potencialaj aplikistoj kun siaj lertoj kaj rimedoj malkovros kaj ekspluatos la lingvon.

Kvankam naivaj revoj pri baldaŭa "fina venko" povas naski frustruojn, certe iel forigendajn, estus tamen grava eraro elimini deziron pri signifa disvastiga sukceso, ĉar tion farinte, la komunumo riskus nenion rimarki, se subite kaj neatendite maturiĝus kondiĉoj kiuj malfermus la vojon al tio.

La nuna tasko estas krei tiujn antaŭkondiĉojn, kies manko aŭ malforto bremsus esperanton en la koncerna momento ĉe transiro al tiu vast-skala uzado.

Esperanto defendata

La apuda nefermita letero modele montras sendube necesan agon de esperantistaj aktivuloj.

Sen tiaj "pretekstoj" nia mesaĝo al la mondo ofte ne estas sufiĉe interesa por redaktoroj de amas-komunikiloj. Sed se iu konata homo diras ion rilate ĉu rekte esperanton, ĉu lingvajn demandojn en internaciaj rilatoj, reagante al tio ni povas menci nian starpunkton, esperante reagon de la konatulo, kion li supozeble faras por ne resti miskomprenata kaj pro tio malsimpatia eĉ por tiuj, kiuj entute ne komprenas la konkretan temon.

Ne estas nia intenco kuraĝigi ĉiam ĉiun refuti, ĉar maltaŭge farita reago povas eĉ pli malutili ol utili. Tial estus utile legi komentojn pri la apuda ekzemplo, ĉu ĝi bone plenumis sian rolon. La celo de tiu kritiko estas lerni el ĝi, aŭ eĉ fari diversajn modelojn adapteblajn al la konkretaj cirkonstancoj.

Gravaj vidpunktoj estas de refuto: kiu reagu, en kies nomo, per kiuj argumentoj, en kiu stilo, kaj eble aliaj. Kion vi opinias pri tio?

(Daŭrigo de paĝo 1.)

Al d-ro Béla Mészáros
prezidanto, respondeca redaktoro de
Esperanto-Asocio de Debrecen kaj Ĝia Regiono

Estimata Sinjoro Prezidanto!

Mi deziras pagi mian ŝuldon malnovan, preman, kiam fine flankenmetinte ĉion alian mi respondas la nefermitan leteron aperitan en la dua ĉi jara numero de Debrecena Bulteno. Neniel mi ŝatus, se tiu ĉi jaro forpatus kun "kolero" de kiu ajn (Vidu: Ne malleviĝu la suno kun via kolero.). Mi petas pardonon pro la malfruo, eble vi ne bezonas, ke mi klarigu ĝiajn kaŭzojn.

Mi ekstreme bedaŭras, ke per mia sengarda, ne sufiĉe pripensita deklaro mi ŝajne montriĝis kontraŭanto de esperantistoj.

Mi rapidas deklari, ke pri via letero, pri celoj kaj spirito de la esperantismo mi komplete konsentas kaj laŭ mia opinio, via movado meritas senrezervan distingon. Eĉ tio ne malgrandigas viajn meritojn, ke entute mi opinias vian lingvan

alternativon utopieca, ja viaj partaj sukcesoj nepre servis ĉiam la universalan aferon kaj interesojn de la homaro.

En la senco de ĉio ĉi mi emfazas, ke en mia televida deklaro mi neniel havis intencan mallaŭdi esperantismen, maksimume, per la forto de troigo mi strebis emfazi la gravecon de la gepatra lingvo la hungara, kaj intertempe mi konceptis miskomprenable pri esperanto.

Cetere, en la servo al nacia repaciĝo ankaŭ mi mem reprezentas aferon konforman kun viaj ideoj-idealaj. Dankante vin pro via komprenemo en la nefermita letero, ankaŭ estontece mi strebos eĉ pli bone meriti tion. Ankaŭ pro via menciita subteno mi dankas vin. Petante Dian benon al via agado, mi deziras al vi kaj al via asocio favorplenan, sukcesan laboron en la nova jaro

*Oradea/Nagyvárad, 1991.12.27.
kun estimo kaj amo:*

László Tőkés
episkopo

(laŭ Debrecena Bulteno feb/92)

Faka aplikado

Vivu (el) Esperanto!

Nia bela, praktika, logika, facila, internacia ktp. lingvo esperanto jam havas pli ol 100 jarojn.

Ĉu ni povas diri, ke esperanto estas en bona rekonata pozicio en la mondo, en internaciaj kontaktoj? Ĉu esperanto senmanke plenumas sian taskon, ĉu ĝi bone, kaj multflanke servas al la homaro? Bedaŭrinde al tiuj demandoj ni ne povas jese respondi, se ni vidas la faktojn reale, kaj ni parolas kun respondeco.

Kial esperanto ne povis akiri pli gravan postenon jam dum la pli ol centjara periodo, kial tiom malmultas ankoraŭ ĉiam ĝiaj uzantoj? Kial malaperas tiel granda procento de tiuj, kiuj ellernis, aŭ komencis lerni la lingvon?

Mi pensas, eĉ estas konvikita, ke la kaŭzo estas en la aplikad-ebleco de la lingvo. La pasintan kaj nuntempan situacion karakterizas la preskaŭ nura kultura idealisma, turisma alproksimiĝo al esperanto, kaj neglekteble sen-signifa laborlingva, ekonomika uzado.

Esperanto preskaŭ ĉiam nur konsumas monon de la uzanto, ja oni pagas por lingvaj kursoj, libroj, esperantaĵoj, korespondado, membriĝo ĉe iu asocio, vojaĝo, partoprenkotiĝoj de diversaj aranĝoj, ktp. **Grave mankas la ebleco por profitdona laborlingva internacia uzado de Esperanto!!! Mi asertas, ke tio estas unu el la ŝlosilaj problemoj.** Mi alte taksas la

kulturan, kaj idealisman rolon de la lingvo, ĝi estas bezonata, grava, ne malhavebla, sed ni devas rimarki, ke ne plu sufiĉa! Alvenis novaj tempoj, ni devas pensi alimaniere, kaj strebi al novaj celoj.

Oni devas konsideri, ke bedaŭrinde, la vivnivelo multloke stagnas, eĉ falas, multaj homaj devas vivi multe pli ŝpareme ol antaŭ kelkaj jaroj, ne plu abundas mono por hobiaj celoj, oni rezignas pri hobiaj, ofte pro nura manko de mono, kaj tempo! Kaj jen, se esperanto estas nur ia monkonsuma hobiaĵo, oni rezignas pri ĝi. Sed se ĝi povus esti iu rimedo por akiri la tiom grave bezonatajn kromajn enspezojn, certe la situacio estus alia!

Malrapide, sed certe marŝadas esperanto al la abismo pro la supre menciitaj kaŭzoj! Tio estas haltigebla, eĉ returnebla, sed la solvo dependas nur de ni, parolantoj de la lingvo. **Vane ni atendas miraklon, decidon de registaroj, instancoj favore al esperanto! Esperanton nur ni povas kaj devas levi alten! La sola solvo kaj savo estas la aktiva internacia laborlingva uzado de la lingvo! Kiel?**

Jen mia oferto por fari la komencajn paŝojn:

En internacia komerco...

Mi fondis mian etan firmaon kun la nomo *Agentejo SORTIMENTO*, kaj mi komencis serĉi la eblecojn por la internacia praktika uzado profitdona.

Baldaŭ mi kontaktiĝis kun la gazeto *Monda Merkato* eldonita en Germanio, kiu estas internacia, esperantlingva gazeto por anoncoj de en-

treprenej kaj privataj personoj, sendata nun al 70 landoj. La gazeto havas grandajn ŝancojn, kaj la redaktoro volonte atendas kunlaborantojn el la tuta mondo, kiuj havos la taskon esti anonckolektantoj por la gazeto kontraŭ bona makleraĵo.

Mia dua propono estas kunlaboro kun la negoca semajna informgazeto *World-Contact Business Plus*, eldonita de *World-Contact* kiu estas internacia informserva firmao.

WBP atingas ĉiusemajne 20 000 hungarajn firmaojn, kaj enhavas diverslandajn anoncojn negocajn, komercajn. La anoncoj aperas sen la adreso de la anoncinto, sed havas kodnumeron, kaj se iu firmao en Hungario trovas interesan oferton, ĝi povas peti la adreson de la anoncinto, kontraŭ pago de iu certa sumo. **Eksterlandaj firmaoj povas SENPAGE anonci en WBP!** Ni atendas el la tuta mondo esperantistojn anonckolektantojn por WBP, kun bona makleraĵo! Jen la bona ebleco utiligi esperanton en la laboro profitdona!!!

La tasko de anonckolektantoj estas kolektado de originalaj anoncoj ĉe firmaoj, entreprenej, ktp. kaj traduko al esperanto.

En la anoncoj oni povas difini la korespondan(j)n lingvo(j)n, kaj ĝi povas esti ekzemple ankaŭ esperanto! Jen la anonckolektanto povas oferti siajn tradukajn servojn al la firmao, kiu donis la anoncon (kompreneble kontraŭ pago). Ni atendas nepre intereso-vekajn anoncojn. Estas akceptataj nur originalaj anoncoj, ne eltondaĵoj el gazetoj, kaj similaj.

Detaloj pri la laboro, pago de makleraĵo estos sendataj al interesigantoj, kiuj devas skribe kandidatiĝi, sinprezenti, kaj havi bonan lingvoscion de esperanto.

Tria ebleco estas kunlabori kun mi en la periodo de komercaj kontaktoj kun inĝeniera kaj eksport-import firmao Hyding, kun mia geografie plej proksima kunlaboranto. La firmao rilatas tre favore al esperanto, kaj intencas vaste komerci. Do se la ofertoj interesas vin, se mi konvinkis vin, bv. skribi al mi, kaj fari plian vastan propagandon por la menciitaj eblecoj!

BAJÁKI Imre

Dr. Holló Lajos u. 61. V/75.

Kiskunfélegyháza, H-6100 Hungario

Monda Merkato

tutmonda gazeto kun anoncoj de entreprenej kaj privataj personoj

Aperis la du numeroj de MM promesitaj por 1991 de la eldonanto. En 1992 estas planata tri kaj en 1993 kvar numeroj. Jen la komuniko de la eldonanto koncerne la planojn:

Jam nun MM meritas sian nomon, ĝi havas legantojn en pli ol sepdek landoj. Ni tamen ne estas kontentaj. La planata nombro estas pli ol cent landoj. Pro tio ni nepre bezonas adresojn de esperanto-organizaĵoj en aliaj landoj. La redakcio volas sendi senpagan provkzempleron al tiuj organizaĵoj.

La sistemo de distribuado de la gazeto kaj perado de anoncoj pere de landaj kunlaborantoj nun ekfunkcias. Tio faciligas la kontakton de la anoncanto, ĉar la relative malfacila internacia transpago ne plu estas bezonata. Pliaj kunlaborantoj estas atendataj.

Informsistemo de Monda Merkato: estas enkoputiligitaj ĉiuj informoj kaj estos serĉataj informpetantaj kontaktadreso.

Venis multaj proponoj por plibonigi la aspekton de la gazeto. Numero 1992/1 havos novan titoloĝon, ĉar la redakcio jam anoncis tiucelan konkurson.

Krome la numero 1992/1 ofertos por la unua fojo eblecon publikigi anoncojn kun bildoj kaj anoncojn multkolorajn.

Monda Merkato estas senpaga gazeto, oni devas pagi nur la sendokoston. Petu specimenon kontraŭ 1 respondkuponon!

Eldonas: Linguistisches Bureau, A. Schubert, Pf. 1539, D-W-8120 Weilheim, Germanio



Kontaktoj serĉataj!

“Ni jam klare opinias, ke la praktika uzado de Esperanto estas pli kaj pli granda, tial ni volas uzi en niaj servoj ankaŭ esperanton. Sekve ni serĉas esperanto-organizaĵojn aŭ individuojn, kiuj volonte kunlaborus kun ni, ĉefe en sociaj-, sciencaj-, teknikaj-, kultura-, ekonomiaj- kaj komercaj terenoj. Tang-Shan Esperanto-Asocio, 3 hao Xin Xiang, Tang Shan He Bei, CN-063000 Ĉinio.”

Mezaĝa bulgara inĝeniero serĉas negockontaktojn kun entreprenema esperantisto el Okcidenta Eŭropo aŭ Ameriko por reciproke utila produkta aŭ komerca kunagado. Nikola Uzunov, 3 Remsisti 18/B-10, BG-6300 Haskovo, Bulgario.

Pola entrepreno serĉas kunlaboranton por komuna entrepreno por konstrui ripozdomo(j)n en la pitoreska montara urbeto Karpacz. Pliaj informoj: “Fortuna-Lex” Kancelario de jura helpo, ul. Cegielniana 2/28, PL-62-800 Kalisz.

Informilo pri Naturkuracado

Aperis la sesa numero de *ENA-informilo*. Ĝi informas pri la nova statuto de ENA (Esperantista Naturkuracista Asocio), nova estraro, pri 83 membroj kaj planoj por la unua ĝenerala kunveno.

Oni povas legi pri saniĝo per marŝado, saniga dieto el Irano, la 12 principoj por sana vivo de Porfirij Kornejeviĉ Ivanov, kaj pluraj pliaj interesaĵoj. Interesatoj pri homeopatio, orienta medicino, akupunkturo, masaĝo, dietistiko, joko kaj aliaj tradiciaj kuracmanieroj en diversaj mondpartoj, petu provnumeron de la redakcio. Abono (membriĝo) kostas duonon de MJ-kotizo pagenda al UEA-konto seĝe-l. Sekretario:

Puramo Chong

C.P.O. Kesto 3047, Seulo, Koreio

Konkurso

IO, KIO MANKAS EN NIA LABORO

Kun granda plezuro mi legis la proklamon de Voss kaj ĉiuj decidoj, rezolucioj de UEA kaj ILEI plaĉas al mi. Laŭ tiuj dokumentoj opinante ke la grundo estas pli-malpli preparita, mi riskas elmeti mian proponon al publika kritiko kaj, ĉe aprobo, mi petas helpon por realigi la ideojn.

Kelkaj el la legantoj de IPR eble memoras la sciigon pri konstanta konkurso de lernejoj (3/91, p. 12), al kiu pasintjare aliĝis en Hungario 9 lernejoj kun 241 geknaboj. En novembro la nombro de la lernejoj kreskis al 15. Ĉi-jare ni lanĉis alian konkurson (memore al K. Kalocsay) pri arta traduko. En ĝi partoprenis 8 lernejoj kun pli ol 100 geknaboj.

Kial mi parolas pri ĉio ĉi? Ĉar dum la pasintaj 15 monatoj evidentiĝis, ke ekzistas multaj pedagogoj, kiuj estas pretaj oferti tempon, energion, eĉ iom da mono por sia lernantaro. Samtempe montriĝis, ke nenio kontribuas pli efike al firmaj kontaktoj ol komuna laboro, en kiu ĉiu aktivadas laŭ sia forto. Probable neniu dubas pri tio: ne vortoj, sed faroj kreas kolektivon. Tiel same, certe neniu dubas, ke ni multe bezonas agemajn kolektivojn.

Por efektiviĝi tiun celon kaj por levi la lingvan nivelon de la lernantoj, por amikiĝi ilin trans la naciaj limoj, mi proponas fondi en la kadroj de ILEI internacian labor-komisionon pri E-konkursoj por lernejoj. (Intertempe fondiĝis, kaj gvidas ĝin s-ro Kurucz. La red.)

Kiajn konkursojn mi trovas tre utilaj?

1) Ni ne ĉesigus la ĉiumonatan poentokolektan konkurson, kiu daŭras de septembro ĝis majo kaj pri kiu mi aludis ĉi-supre. La ĝisnunaj enlandaj spertoj estas internaciigindaj.

2) La tradicia (en Hungario) deklamkonkurso povus alpreni la nomon de J. Baghy kaj transpaŝi la landlimon.

3) Apogindaj ŝajnas konkursoj (laŭlande) pri arta traduko memore al K. Kalocsay.

4) Estus tre utile lanĉi (memore al Ivo Lapenna) konkurson pri „modela parolo en Esperanto”.

5) La pinto de la konkursoj povus fariĝi

la alian ne laŭ alparolo en iu somera Ekunsido, sed en la efektiva laboro.

c) La konkursoj efikus unuige en ĉiuj terenoj de nia aktivado, el kio multe profitus nia tuta membraro.

d) Ĉiu konkurso havus sian estron kaj aktivularon, sekve la tuta laboro, kiu sin direktus al unu komuna celo, estus bone dividita.

Multaj niaj adeptoj fariĝus do pli agemaj tiel, ke neniu estus tamen tro ŝarĝita.

El ĉiuj skize prezentitaj aktivecoj profitus nia tuta kolegaro, lernantaro kaj, finfine kaj sendube: nia tuta movado.

Praktikantaj instruistoj, kiuj konsideras iun el la ideoj apoginda, subteninda, kaj kiuj sentas en si forton iom kontribui al ilia realigo, kaj kiuj havas aliajn formojn de konkursoj, povas aliĝi al ni, skribante leteron al la adreso de la subskribinto. Cetero la konkursoj prezentitaj sub la unuaj tri punktoj, jam havas regularon, ĉiu povas konatiĝi kun ili, estas bezonata nur scivoli kaj decidemo.

Esperante ke la ideo fondi aktivan laborkomisionon pri konkursoj interlernejaj fariĝos utila kaj fruktoporta iniciato, kaj ke ĝi donos al nia movado almenaŭ iom da puŝeto antaŭen, atendas viajn reagojn kaj helpon

s-ro Géza Kurucz,

Gimnazio Júlia Bányai

H-6000 KECSKEMÉT, Nyíri út 11.

Hungario

Regularo de Internacia Konkurso por Lernejoj

1. En la konkurso povas partopreni nur lernejoj ĝis la aĝo de 18 jaroj. Junuloj, kiuj lernas esperanton en eksterlernejaj kursoj aŭ memstare, rajtas alsendi siajn solvolfoliojn, sed ili ne eniras la oficialan liston, t.e. ili partoprenas en ĝi eksterkonkurse. Oni povas aliĝi al la konkurso ĉe ioma ajn numero.

2. La konkurso havas du kategoriojn laŭ aĝo: la unua ampleksas lernantojn ĝis la aĝo de 14 jaroj, la dua lernejarojn inter la aĝoj 14-18 jaroj. Ambaŭ kategorioj havas du grupojn, nome: tiun de la komencantoj (K) kaj progresintoj (P). La unuan formas geknaboj kun ne pli ol du lernejaroj en esperanto, al la dua apartenas ĉiuj, kiuj lernas esperanton dum pli ol du jaroj. Entute ekzistas do 4 grupoj, po du en ambaŭ kategorioj.

3. La konkurso ĉiam daŭras unu lernejaron (en la norda hemisfero): de oktobro ĝis majo. En la daŭro de la lernejaroj ĉiumonate aperas taskofolioj por ambaŭ kategorioj (sep folioj lernejaroj). La unua estas sendita al tiu lernejo, kiu ĝin petas letere kaj sendas koverton afrankitan (en internaciaj rilatoj respondkuponon) kaj adresitan al si mem. Ĉiu folio enhavas 6-10 simplajn taskojn, per kies senrara solvo estas akireblaj 20 poentoj. La solvoj estu skribitaj en esperanto sur simpla duona leterpapero (A5) kaj senditaj al la adreso donita sur la taskofolio mem, (ĉiujfoje alia, la redaktinto de la koncerna taskofolio).

4. En la konkurso povas partopreni nur lernantoj, sur kies taskofolio la esperanto-instruisto atestas per sia subskribo kaj stampo de la lernejo, ke la konkurso estas lerneja. La solvolfolio enhavu la kompletan nomon de la lernanto, la kategorion (B = bazlernejo, M = mezlernejo) kaj la grupon (K, P), ekz. M/K.

5. La instruisto kolektas ĉiujn taskofoliojn de sia lernejo kaj sendas ilin en komuna koverto ĝis la signita limdato (validas la poŝta stampo de la sendo) al la donita adreso. Por ricevi la korektitajn solvolfoliojn kaj ricevi novajn taskofoliojn la instruisto sendas kun la solvolfolioj precize adresitan respondkoverton afrankitan (aŭ internacian respondkuponon). Post korekto de la solvolfolioj ili revenas en la lernejon. Ĉe-mete troviĝas ankaŭ la ĝusta solvo de la antaŭa numero kaj dorsflanke la nomaro de la plej elstaraj konkursanoj. La unuaj estas regule voĉlegataj en la esperanta programo de la Hungara Radio (aŭdebla nur en Hungario) kaj publikigita en Eventoj.

6. Post la lasta numero la plej sukcesaj konkursanoj estas premiataj. Regularon por instruistoj redaktantaj taskofoliojn petu de Esperanto-grupo de Gimnazio "Júlia Bányai", H-6000 Kecskemét, Nyíri út 11, Hungario

ĉiujaraj Olimpikoj de lernejoj studantaj esperanton.

La vico estas longigebla. Kio estas la avantaĝo de tiaj konkursoj?

a) Ili devigas la instruistojn kaj konkursantojn trejni sin kaj kompari siajn rezultojn al tiuj de la kolegoj. Tio estas neimageble forta movilo ĉe ambiciaj pedagogoj.

b) Nia instruistaro kaj lernantaro povus elpaŝi el la paraliziga izoliteco. Ili ekkonus unu

Bedaŭrinde laŭ la regulo 5. pro la monata ritmo reale povas partopreni nur malmultaj eksterlandanoj. Se la venontaj taskoj ne estus nur sendataj kun la korektitaj antaŭaj solvoj, sed aperus ankaŭ en la gazetaro, tiam verŝajne multe pli da eksterlandanoj povus partopreni. Koncernatoj ankaŭ mem faru siajn proponojn.

ŝ. H.

Gazetara Komunikado de ILEI, 24.02.92.

Rekorda jaro por la ekzamenoj

Cent du kandidatoj sukcesis en la lingvaj ekzamenoj de UEA/ILEI en 1991! 35 je elementa kaj 67 je la meza nivelo. Tio estas pli ol sume en la antaŭaj jaroj, de post la relanĉo en 1989. Rekorda estis ankaŭ la nombro da sesioj: dek en ok landoj: Belgio (13 sukcesintoj), Bulgario (13), Ĉinio (27 en tri sesioj), Germanio (1), Hungario (10), Jugoslavio (2), Rumanio (21) kaj la UK en Norvegio (15). Klare la ekzamenoj disiras en la mondon kaj atingas la bezonlokojn, kie naciaj ekzamenoj ne ekzistas, ĉu pro manko de fortoj, ĉu pro konscia decido kiel en Belgio ke preferindas dediĉi la fortojn de la aliaj taskoj. Aliflanke, la ekspansio en landoj kun neokcidentaj ekonomioj signifas, ke la kvanta sukceso ne havas por ILEI kompareblan financon reeĥon.

Ĉar la nuna sekretario transdonas la administradon al nova ekde januaro 1992, estas

taŭga okazo resumi la tri jarojn 1989-91. Estis organizitaj 26 sesioj en 15 landoj en 4 kontinentoj kun 186 sukcesintoj (66 elemente kaj 120 meze) el 31 landoj el ĉiuj kvin kontinentoj: 63 en okcidenta Eŭropo, 52 en orienta, 43 el Azio, 23 el Ameriko, 4 el Afriko kaj unu el Oceanio. Rumanio gastigis la plej grandan sesion, dum Ĉinio organizis la plej grandan nombron da sesioj en unu jaro (tri). Ĝi plie havas la plej grandan nombron da sukcesintoj (41) kaj dividas kun Svislando la rekordon por la nombro da sesioj tra la tri jaroj.

Tiom intensa ofertado postulas daŭran kreadon de novaj testoj kaj tio tre forte premas la limigitajn rimedojn de ILEI; kompetentaj kunlaborantoj estas bonvenaj. Alia daŭre nesolvebla paŝo estas iel agnoski la ekzamenojn ĉe ekstermovada eduka instanco.

En 1992 sesioj estas planataj en Ĉinio, en Zagrebo, en la UK kaj eble en Kastelo Grésillon. Centroj aŭ asocioj dezirantaj gastigi ekzamenan sesion, kaj kunlaboremuloj, bv. kon-

takti la novan sekretarion de IEK, s-ino Marie Hunnink, Esperanto, Centre Culturel "La Charité", B.P. 136, F-84200 Carpentras, Francio

Detala protokolo aperos en numero 92/1 de Internacia Pedagogia Revuo.


Stefan MacGill

Prezidanto de ILEI

Esó u. 7. III.

H-1034 Budapest

Hungario



Arangoj

Invito al la ILEI-GIMNAZIO

Karaj Gejunuloj 13-16-jaraj!

La Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) invitas vin partopreni Internacian Someran Gimnazian Semajnon (ILEI-Gimnazio) de la 1-a ĝis la 7-a de aŭgusto 1992 en Bratislava (Ĉeĥo-Slovakio).

En la gimnazia semajno vi povos

- interamikiĝi kun geknaboj el plej diversaj landoj de la mondo;
- ĝui kelkajn *interesajn*, ne-lernejecajn *stud-horojn* (nur 30-minutajn!) pri E-lingvo, E-literaturo, matematiko, geografio, muziko, sporto kaj arto, *lernante kuriozaĵojn*;
- ekskursi, viziti vidindaĵojn de la regiono, ludi, amuziĝi kaj mem proponi, iniciati aŭ eĉ gvidi kelkajn programerojn.

Ankaŭ la instruistaro estos internacia: ges-roj R. kaj F-G. Rössler, Germanio, s-ro Stefan MacGill, Novzelando/Hungario, s-ro P. Arnaudov, Bulgario, s-ro P. Smid, Ĉeĥo-Slovakio kaj aliaj bonaj fakuloj.

Vi estas bonvena en la ILEI-Gimnazio, se

- vi havas aĝon de 13-16 jaroj,
- vi bone parolas la lingvon esperanto,
- vi volonte submetiĝas al la disciplino de la Gimnazio,
- viaj gepatroj (aŭ iu societo k.s.) entreprenas pagi la partoprenkotizon kaj la vojaĝon.

Tute *ne gravas*, kiuspecan lernejon vi vizitas en via lando, nek tio, kiujn juĝotojn vi havas el la menciitaj fakoj.



Gravas, ke vi fartu bone en internacia societo de samaĝuloj, krome ke vi volu fariĝi pli kaj pli klera kaj sperta, lernante en amuza formo en la Internacia Lingvo.

El inter la resendintoj de la aliĝilo ILEI elektos ĉ. 20 geknabojn por la gimnazia semajno. La kotizo por la ILEI-Gimnazio estas:

Tarifo A : 250 NLG (800 SEK.) por Okcidenta Eŭropo, Norda Ameriko, Japanio, Aŭstralio+Oceanio.

Tarifo B: 2240 ĈSK, 4480 HUF, 150 NLG, 480 SEK. por ĉiuj ceteraj landoj, aparte ne menciitaj.

Tarifo C: 1600 ĈSK, 3200 HUF, 110 NLG, 320 SEK. por ĉeĥoj, slovakoj, rumanoj, albanoj, baltianoj, sovetianoj, ĉinoj, afrikanoj.

Pri la pagmaniero ni informos tiujn, kies aliĝojn ILEI povos akcepti. La menciitaj sumoj inkludas loĝadon, manĝadon (3-foje tage) kaj la tutan programon kun ekskurso. Krome (ekster tiu sumo) estas la vojaĝkosto kaj iom da poŝmono.

Aliĝilon bonvolu peti kaj *resendi* ĝis la 31-a de marto al S-ino BARCSAY Zsuzsa, Bem rakpart 25/B, H-1011 Budapest, Hungario, Tel.: -36-1-201-2342

(laŭ IPR 91/4)

Internacia Esperanto-Kongreso

por la pli aĝa generacio
5-12 septembro 1992, Augsburg, Germanio

La konata kongresurbo Augsburg denove invitas esperantistojn, ĉifoje sen hasto kiu dum normalaj kongresoj pelas onin. Ĝi estos ĉefe ripoziga, feria, ĉefe por pliaĝuloj.

Aliĝkotizo: ĝis 31.03. – 75 DEM,
ĝis 10.06 – 95 DEM

Manĝoj (3-foje tage): 180 DEM

Trankotejo: varias 40-130 DEM laŭ kategorioj.

Pliaj informoj ĉe:

*Esperanto-Press,
Augsburg, Waterloostr. 21,
D-W-8900 Augsburg, Germanio*



INTERNACIA JUNULARA FESTIVALO

inter 15-21 de aprilo
en La Salle (Aosta), Italio


IJF estas unu el la plej konataj printempaj junularaj arangoj. La ĉi jara temo de la arango: "Eŭropa kuniĝo kaj naciismo". La Festivalo okazos en la valo de Aosta, je kelkdek kilometroj de Mont Blanc. Verŝajne oni povos rapide sunbruniĝi dank' al la neĝo, kiu kovras la valon dum duono de la jaro. Sed ne timu... La junulargastejo estos varma, kaj krom la ĉeftemaj prelegoj oni havos aron de diversaj programeroj, kaj espereble ankaŭ ĉi-jare oni travivos la konatan IJF-etoson! La kotizo por gejunuloj sub 26 jaroj estas 205, inter 27 kaj 30 jaroj estas 220 kaj por pliaĝuloj estas 250 mil liroj. Memzorgantoj (kiuj nek manĝos nek dormos en la Festivalejo) kunportu dormsakon kaj matrakon. Aliĝilon kaj pliajn informojn petu ĉe:

Itala Esperanto Junularo

Enrico Agliotti

Via Pellice 19, I-10139 Torino, Italio

Telefono: +39-11-374336



Printempa Semajno Internacia

inter 13-20. de aprilo
en Bad Neunahr-Ahrweiler en Germanio

La arango estas precipe familia seminario. La programo kontentigas egalrajte la plenkreskulojn kaj la infanojn. Programofertoj kaj proponoj estas bonvenaj. La organizantoj zorgos pri turismaj programoj kaj pri diversnivelaĵoj esperanto-kursoj, ja ankaŭ komencantoj estas bonvenaj. La arango okazos en junularhotelo kun 2- kaj 4-litaj ĉambroj. La kotizo tre varias depende de la aĝo: por infanoj inter 0 kaj 230 DEM, por plenkreskuloj 340 DEM. Eksterlandaj plenkreskuloj ricevas rabaton de 25 DM. Speciale favoraj kondiĉoj por personoj el orienta Eŭropo laŭ interkonsento. Pliajn informojn petu ĉe:

*Wolfgang Bohr
Johannes-Kirschweg-Str. 11,
D-5483 Bad Neuenahr*

Eŭropa Kongreso de Esperanto

Verona, Italio
5-9 junio, 1992.

Sian oficialan partoprenon jam anoncis la brita, franca, itala kaj portugala asocioj. Pliaj asocioj estas atendataj.

La temo estos "La interkomunikado en Eŭropo: disfaliĝi la lingvajn murojn". Oni traktos ĝin i.a. per ronda tablo antaŭ neesperantista publiko. Estas planataj laborkunsidoj, kaj diversaj kulturaj programoj.

Aliĝiloj kaj detaloj haveblas ĉe:

Michela Lipari

v. le Giulio Cesare 223, I-00192 Roma.

Telafakso: +39-06-310292



Tutlanda Renkontiĝo okaze de la 90-a datreveno de HEA

22-24 de majo, 1992

Sabate jarkunveno de HEA kun kultura programo, vespere balo. Partoprenkotizo depende inter 400-1500 HUF.

Lasta aliĝdato: 10-a de aprilo.

Org: HEA, Pf. 193, H-1368 Budapest, Hungario

**Pri aktualaj eventoj
sendu informon
al EVENTOJ!**

Lingvo

Roel Haveman.

Seksismo en esperanto

Seksismo estas distingo inter virinoj kaj viroj laŭ nekonvenaj kriterioj. Ke esperanto havas seksismajn trajtojn estas evidente: ekzistas speciala sufikso por indiki inecon (-in), dum mankas speciala sufikso por indiki virecon. Pro tio ke vortoj kiel esperantisto kaj sekretario estas neŭtraj kaj viraj, ne eblas insisti pri vireco, sed ja pri ineco. Oni povas diri, ke tio estas eraro de Zamenhof. Sed eraro estas komprenebla se oni konsideras lian epokon.

Tamen oni povas dubi ĉu la afero pliboniĝas intertempe, ĉar dum renkontiĝoj oni kelkfoje povas aŭdi tiaĵojn:

- Pardonu, ĉu vi estas esperantisto?

- Mi ne estas esperantisto, sed male: esperantistino!

- Kiu estas la sekretario de via asocio?

- Nia asocio ne havas sekretarion, sed sekretariinon!

Ĉi tiun pliakraĵon de seksismo verŝajne kaŭzas la influo de naciaj lingvoj (oni ja vidas *studentino* kaj *neniam viktimitino*). Oni do ne sentas la neŭtran sencon de la vortoj.

Radikoj laŭ kategorioj

Neŭtraj-viraj: vortoj kiuj finiĝas per -isto, -anto, -ato, -ito, -ulo, -ido, ktp, kaj ankaŭ kiel studento, direktoro, amiko, viktimo, belgo, ktp.

Ekskluzivan inecon oni povas indiki per -in, -nj kaj ekskluzivan virecon nur en karesa situacio -ĉj. Ekskluzivan neŭtrecon eblas esprimi nur plurale per ge- oĵ.

Propono: oni interpretu ĉiujn ĝis nunajn neŭtraj kaj enkonduku viran sufikson analoge al -in. Ĝi estu eble -iĉ pro ĝia konvena loko en serio *in/nj* kaj *iĉ/ĉj*.

Verŝajne multaj protestus kontraŭ la iom fremde sonantaj lingvistiĉo, kristaniĉo, ministriĉo. Ne timu, plej ofte sufiĉas la neŭtra vorto. Ofte membrino estas same absurda ol membrino.

KŜŜ kaj KŜŜ-anoj

Ni multe diskutis pri la ĝustusenca uzo de vortoj "soveta" kaj "sovetia". La vivo jen solvis tiun problemon. Ne plu ekzistas la lando Sovetunio/Sovetio. Ekde nun la vorto havas nur la signifon "konsilantaro/konsilio".

Kiel en ĉiuj aliaj lingvoj, oni devas nomi ankaŭ en esperanto loĝantojn de ĉiu lando. La loĝantoj de la iama Sovetio estis nomataj sovetianoj, se ne rigardi ilian naciecon. Perdinte la vortradikon de tiu vorto, ni, esperantistoj devas trovi alian manieron nomi la loĝantojn de tiu nova ŝtato. La ŝtato estis nomata Komunumo de Sendependaj Ŝtatoj (akronime KŜŜ, elparolu Ko-So-Ŝo), ni ekuzu KŜŜ-anoj. Cetere estas konsilinde informiĝi pri la nacieco de la koncernaj personoj, ĉu blankruso, ukraino, ktp. ĉar ĉiuj honestaj homoj fieras pri sia nacieco.

Tibor PAPP, hungaro
laŭ Debrecena Bulteno n-ro 68.

(Ankaŭ estas konata propono -ir kiu povas memoriĝi al vir, nur bedaŭrinde tro similsonas al -in, ekz. studentiro, ĉevaliro. La Red.)

Viraj radikoj: parenconomoj (patro, frato, filo, kuzo, ktp) kaj kiel viro, sinjoro, edzo, fianĉo, knabo, ktp. En tiuj kazoj ni devas akcepti iom da seksismo en la lingvo. Ne eblas deklari, ĉar neniu akceptus, ke patro signifas ankaŭ patrino. Kelkaj tamen sentas la bezonon de ĝenerala maniero singularare, ĉar nur kelkfoje ekzistas (alia) vorto por esprimi tion (virohomo, knaboinfano). En tiaj kazoj eblu uzi singularan uzon de ge- (ekz. infanoj rajtas eniri sub gvido de gepatro).

Nevariivaj radikoj: kelkaj vortoj pro sia signifo apartenas ekskluzive al unu sekso.

Ekzemple viraj: li, masklo, eŭnuko; inaj: ŝi, femalo, primadono, putino, damo; neŭtra: ĝi, si, oni, mi, vi, individuo, persono, infano.

Ĉi tie menciendas la zamenhova uzo de persona pronomo *li* ankaŭ en ĝenerala formo "*ĉiu amas*

ordinare personon, kiu estas simila al li". En tiu kazo estus preferinde forĵeti malamcon de *ĝi*, kiu same taŭgus, kaj cetere Zamenhof ankaŭ tion ne malaprobas. En Lingvaj Respondoj li donas jenan ekzemplon: "*riĉulo pensas, ke ĉio devas servi al ĝi*". Tion ni konsideru, ĉar ankaŭ en la pluralo malestas problemoj pri la neŭtra *ili*.

Ankaŭ estas proponoj por personigi (neŭtre) *ĝi*, nome: ŝli, ŝi/li, ti (de tiu). Mi preferas *ĝi-n*.

Seksismo en esperanto do ne estas komplete nekuracebla afero. Plej grave estas kiel oni traktas seksismon en praktiko. En aliaj lingvoj videblas malseksismigaj tendencoj.

Ekzemple nederlande *menskracht* (homforto) = *mankracht* (virforto) kaj angle *salesperson* (komizo) = *salesman* (komiziĉo).

La praktiko montros ĉu ankaŭ la esperantistoj povos adaptiĝi al mondriĝardo grave ŝanĝiganta ekde 1887.

el Fenomeno, marto 1989

Arizona Suno ĝisrevidas

Multaj el ni eĉ ne scias, ke ĝi ekzistis. Ne, pri tio ne kulpas ĝia redaktoro. Vivante nur unu jaron en kvar numerojn, nia diaspora lingvokomunumo bezonas 1-2 jarojn ĝis iu ajn iniciato diskonigigas, revuo abonigigas, ekplaĉas, kaj oni proponas por aliaj, ĝis io ajn sukcesas enradikiĝi. Certe ankaŭ gravas ĉiuj aliaj cirkonstancoj kaj speco de la enhavo, ĉu sufiĉe multaj interesiĝas pri tiuj temoj, kaj ĉu oni sukcesas atingi la potencon legantaron, la celgrupon. Ĉiujare ni renkontas novajn iniciatojn (kiel ankaŭ *Eventoj* mem), kies granda parto ne sukcesas vivteni sin post unu jaro. Eble *ion* la koncerno ne bone antaŭvidis. Sed certe havis grandan entuziasmon, kaj estus tre bonŝance, se tiel grandaj energioj ne perdiĝus post ĉeso de iu projekto, sed aliĝu kiel kontribuanto al aliaj ekzistantaj strukturoj.

Jen la adiaŭa artikolo de la redaktoro de Arizona Suno

Bedaŭrinde, pro manko de sufiĉa financa subtenado, Arizona Suno devas provizore ĉesi aperadi. Kvankam tre modestaspekta kaj legata de nur tre malmulte da homoj (150 abonantoj en 22 landoj), la bulteno estiĝis al sia unuhoma stabaro elspezojn kiujn pensilaj enspezoj nur malfacile kontraŭpezas. Esperote estas, ke estontaj financaj kapabloj permesos la reekfunkciadon de la entrepreno.

Arizona Suno deziras danki al ĉiuj scivolemuloj respondintaj al reklamanoncoj aperintaj dufoje en revuo Monato: al ĉiuj tiaj respondintoj, kaj precipe al ĉiuj elegantoj kiuj sendis leterojn, poŝtmarkojn, ktp. La riĉaj fontoj da aprobo, bonvolo kaj kuraĝigo estas trezoro, kiu simbolas ĉiam por mi la veran gefratecspirito kunligantan ĉiujn erojn de tutmonda Esperantujo.

Ni klarigu, antaŭ ol adiaŭi, la originalan intencan de la bulteno. Esperantistiĝinte en 1989 post 40-jara kariero kiel usona profesoro pri la franca, mi tuj rimarkis tion, ke en la diversaj esperantlingvaj kaj esperant-temaj periodaĵoj ricevitaj oni diskutas plejparte ne pri ĝeneralaj naciaj, nek regionaj kulturaj fenomenoj, sed pri tiulokaj esperantistaj agadoj. "Kiel" la estonta redaktoro demandis al si "diversnaciaj esperantistoj iam kapablos informiĝi nur esperantlingve pri ĝeneralaj naciaj aŭ regionaj kulturoj alilandaj (laŭ deziro de Zamenhof) se esperantlingvaj periodaĵoj traktas nur pri esperantistaj agadoj? Tio estas senlogika paradokso.

Por iom kontraŭbatali tian movadan emon, kaj pro tio, ke sudokcidenta ŝtato Arizono estas aranego de tiom diversaj, riĉaj kaj nekutimaj naturaj kaj kulturaj fenomenoj, mi elektis fondi kulturalan bultenon celantan informi tutmondan esperantistaron pri sia ŝtato sen iam menciitajn esperantistajn okazintaĵojn.

Ĝismomente mi tenas la promeson. Nur jen, en la lasta artikolo de la lasta numero de la promesita jarabono unuafoje esperanto ĉesas esti neŭtra lingva komunikilo kaj fariĝas anstataŭe ĝi mem ĉefa kulturtema celo. Sed se iam ŝanĝotaj cirkonstancoj permesos la reaperon de Arizona Suno, tio estos denove la baza filozofio de la bulteno. Tial, ĝis ebla revido kaj sincerajn dankojn al ĉiuj fidelaj legantoj. Espereble iutage ili povas fariĝi denove legantoj.

Edveno Grobe, redaktoro
1620 North Sunset Drive, Tempe, Arizono
85281, Usono

Opinioj

István Nagy

Mankas movada revuo


Miaopinie tial aperadas, naskiĝas daŭre novaj gazetoj, informiloj, ĉar mankas centra – en-have, lingve altira, interesa, pli ampleksa, ĉiumonate sopire atendata – movada revuo. Tiu movada revuo estus la organo de la tutmonda esperantistaro kaj ne tiu de UEA. La eldonanto povas resti UEA, sed la revuo estas de la tuta Esperanto-movado. Nun UEA havas propran revuon, kio estas memkomprenebla, sed ne la esperantistaro. En la nova revuo trovus lokon ankaŭ la novaĵoj kaj informoj de kelkaj fakorganizaĵoj, ekz. tiu de ĵurnalistoj. La nunaj fakorganizaĵoj tute ne havas tiom da novaĵoj, ke ili bezonas propran gazeton, kaj ne okazas tiom da eventoj, por kiuj ne estus loko en la movada revuo. Jene ĉiu esperantisto informiĝus pri la agado de la tuta movado kaj ne librocenzoj okupas la plej valorajn paĝojn. Tia revuo fortikiĝus ankaŭ la unuecon de la movado kaj esperantistaro.

Hodiaŭ signifa parto de la laboro de seriozaj esperantistoj elĉerpiĝas, ĉar ili klopodas vivteni multobligitan aŭ tre simplan gazeton, informilon: kiel farĉi ĝin per io, ankaŭ per artikoloj. La komencantoj tiujn vidas.

Ofte la gazeteldonado estas esperantista hobia, ŝatokupo.

Mi diras sincere: kion UEA ne povis realigi ĝis nun, tion realigis S. Maul en kelkaj jaroj sola: li kreis nivelan, nuntempan, modernan revuon, unikan magazinon. Ĉu la mondpolitiko pli interesas la esperantistojn ol ilia lingvo?

Mi kuraĝas veti, se Monato pliampleksiĝus per dek paĝoj por esperanto-informoj, eventoj redaktataj en la sama stilo kaj nivelo kiel nun la paĝoj de la magazino, prezentigis kunlaborantoj por la dek paĝoj kaj tuj vidiĝus, ke vigla vivo regas en Esperantujo. Cetere en Monato ankaŭ nun aperadas primovadaj artikoloj, okupante la paĝojn de politikaj, ekonomiaj informoj. Do, Monato kun Esperanto-Suplemento: Movad-Lingva Magazino. Mi nur laŭte pensas kaj ne proponas.



EVENTOJ, esperantó nyelvű információs lap.
Nyt. sz.: B/TSZL/85/1991. ISSN 1215-959 X.
A kiadó és a szerkesztőség címe:
1675 Budapest, pf. 87. Tel: 1288258.
Megjelenik kéthetente. Terjeszti a HELIR.
Készült az M & M nyomdaüzemben,
Budapest, XVI. Bercsényi u. 10.
EVENTOJ, dusemajna gazeto pri la esperanto-movado.
Eldonas Kultura Esperanto-Asocio
kaj LINGVO-Studio, Budapest.
Respondeca eldonanto kaj ĉefredaktoro László Szilvási.
Teknike redaktas Sándor Hideg.

Mi ĉiam malesperiĝas legante bonegan, interesan movadan aŭ lingvan artikolon en iu ne tre konata, ne disvastigita gazeto. Kial ĝi ne povas esti legata almenaŭ en iu el la grandaj gazetoj? Ĝi interesus la inteligentajn esperantistojn. Mia plurjardeka revo estas: *Esperanto Readers Digest*. Ne la originala en esperanto, sed la nia en la sama formato kaj ankaŭ ĝi enhavas la plej bonajn artikolojn en nia gazetaro. Titolo? "Ĉies Revuo"

Reago de Ivo Lapenna:

Tia suplemento povus esti ege alloga legaĵo, se vi, aŭ redaktoro komisiita de vi, bone selektus. Mi tre esperas, ke vi realigos la ideon en 1987, jam ekde januaro. Tio estus vere utila kontribuado de Monato al la Jubilea Jaro.

Reago de Yamasaki Seiko

Mi estas kontraŭ la proponata Esperanto-suplemento de Monato. Monato devas esti ordinara magazino en ĉiu aspekto tute same kiel *Time*, *Der Spiegel* aŭ *L'Express*, Esperantujo devas havi sian propran version de la institucioj en la aliaj ujoj, tiamaniere demonstrante ke esperanto estas nenio alia ol unu el la ordinaraj lingvoj, ne io speciala, io kurioza. Monato estas oazo por mi, kiu volas rifuĝi foje de la movada atmosfero.

Reago de Stefan Maul:

Ĉar venis ne pli ol nur tiuj ĉi du reagoj, nun do mi, la redaktoro, estas tiel saĝa aŭ/kaj malsaĝa kiel antaŭe!

Klare tamen estas, ke kaj pro financaj kaj pro personaraj problemoj nun ni ĉiukaze ne povus realigi Esperanto-suplementon, eĉ se mi volus.

Tamen, okaze de l' jubilea jaro mi ja verkis artikol-serion "Fronte al la jubileo", kaj Monato eldonos por la jubilea jaro la antologion "Sub socia muzo".

el Inter-Monato aprilo 1986

Eble ne ĉiuj konsentas kun I.Nagy, ke "UEA havas propran revuon, sed ne la esperantistaro", kvazaŭ UEA estus nur kelkaj oficistoj. La konstato tamen estas pensiga, por movade nekomentanto kial ŝajnas esti tiel? Eble foje aspektas tiel, do indas pripensi ĉu la movadaj strukturoj adekvatas al la bezonoj, anstataŭ kalkuli, ke esperantistoj ne estas UEA.

ŝ.H

Internacian bultenon!

Nia movado devus leviĝi super naciajn interesojn, la esperantistoj devus prezenti sukcesajn solvojn pri internacia kunlaboro. Mankas bonaj modeloj eĉ inter najbar-landaj esperantistoj. Pro kio nia internacia movado ne eldonas internaciajn revuojn komunajn(!)? Geografiaj, politikaj, ekonomiaj, kulturaj motivoj troviĝas multe, kiuj instigas nin al tia vere komuna agado. De tempo al tempo ni aŭdas pri planoj por komuna eldonado de "Internacia Esperanto-Revuo" en kelkaj (najbaraj) landoj. Sed kiu povas raportiri pri gravaj sukcesoj ĉi-terenaj?

Kruco:

(laŭ Debrecena Bulteno 64)

Gratulon pro via kuraĝa entreprenemo!

...Ĝenerale la esperantistoj hontas postuli pagon al siaj esperantaj laboroj. Kaj ĉio estas senpaga! La konsekvencoj? Parttempa laboro! Neprofesiaj rezultoj! Centoj de bazaj apostolsimilaj lernolibroj sen la respondaj daŭrigaj kaj superaj! Malbelaj gazetoj! Ĉu nomition minuskomplekso? Manko de iniciatemaj entreprenistoj?

Sinjoro Szilvási, tiuj vortoj des pli incitu vin daŭrigi vian projekton. Ke vi investu vian tempon, energion, monon, sed vi ankaŭ ricevu la redonon, ke la jaro 1992 alportu al Vi kaj al viaj kunlaborantoj plenan sukceson!...

*Ivaldo Alves de Souza
Brazilo*

Ĝojigis min la novaĵo,...

... por ke mi denove povos legi esperantaĵon. Mi gratulas kaj deziras al la redaktararo multajn sukcesojn.

Mi nur iomete timas, ke pro la alta prezo malmultaj abonos la novan, la tre mankitan hungaran esperantan revuon.

Tamen mi esperas la renovigon, kiu tiam sukcesos, se la esperantistaro ne timas de sia oferado, kaj kunlaboros por la ununura vera internacia interkomprenilo.

per esperanto por la paco!

*oĉjo Steĉjo, esperanto-amanto
István Bálint, H-6131 Szank, Béke u. 70.
Hungario*

Adiaŭ Hungara Informilo

Hungara Informilo ne plu estas eldonata. Post unujara feliĉa-malfeliĉa ekzisto eldoniĝis la lasta n-ro de HI, kiu oficiale ne estis organo de HEA. Por refuti tion, mi notas, ke sur la titolpaĝo de ĉiuj dek du numeroj aperintaj en 1991 estas skribite: "22-a jarkolekto...", kaj en la kolofono: "jura postorgano de BI". Kompreneble, temas pri tio, ke HI estis posteulo de Budapeŝta Informilo, sed ne oficiale. Oficialaj estis nur tiuj 150 mil forintoj, per kiuj HEA subvenciis la eldonadon de sia "neoficiala" organo. BI estis tia, HI estante jura postorgano de BI, jam ne plu estas tia. Jen (mal)facile solvebla enigmo. Dum la unua kaj samtempe lasta jaro de HI aperis 150 paĝoj A/5 por 300 HUF. Ĉu tio estas ĝojiga aŭ malĝojiga? La plurjardekan agoniadon kaj finan morton de serio da HEA-organoj (*Hungara Esperantisto*, *Eszperantó Magazin*, *Világ és Nyelv* (*Mondo*

kaj Lingvo), *Budapeŝta Informilo*, *Hungara Informilo*) estas kaŭzita de tio, ke en la estraro de HEA neniam estis interkonsento, ke la regulan kontakton kun la membroj oni povas flegi nur pere de centra organo. La nombro de esperanto-libroj, eldonitaj de HEA, jam atingis mondrekordojn, sed kiu prizorgis la proprajn membrojn?

Nun elĉerpiĝis la mono. Nun venos la vico de kvaronjara (poste ĉu duonjara, unujara, dekjara) HEA-informilo, kiu pro la longa aperritmo publikigos multe da "malnovaĵoj". La proceso estas (antaŭ)videbla: HEA-centro devas transformiĝi je informa, organiza oficejo. Laŭ la nuntempaj ebloj ĉiuj ĝiaj funkcioj devas esti nesalajrataj.

Hungara Informilo, ripozu en paco! Sed vi, kompetentuloj en kaj ekster HEA-centro, ne ripozu en paco!

*Tibor Papp
laŭ Debrecena Bulteno, n-ro 68, feb.1992*

Movado

Prelegvojaĝoj atendataj

Laŭ Rumana Esperanto-Asocio estus tre utile por la movado, se venus profesoroj, docentoj, sciencisto-esperantistoj al Rumanio kaj prelegus en universitataj kaj akademijaj rondoj pri diversaj aspektoj de la movado aŭ de la lingvo mem, sed ankaŭ estus tre bonvena, se ili prelegus pri sia fako. La traduko rumanen estas certigota.

Antaŭ nelonge faris tion en Sibiu kaj Timisoara prof. Helmar FRANK, kaj la efiko estis grandega.

Eble tiu ideo estus utila ankaŭ en multaj aliaj landoj. Jen do "nova" tereno por esperanto kaj esperantistaj organizoj.

Bastiono en danĝero

Radio FMR-89 MHz, kiu elsendas la Esperanto-programon de Eŭroka (Esperanto-Rok-Asocio) estas minacata de malapero far de la aŭtoritatoj kaj de speciala komisiono por radio-televido ktp. por esti anstataŭigita de komerca nacia radioĉeno kiel multaj aliaj!

Sendu kuraĝigon kaj protestleteron al:

Radio FMR, Esperanto Redakcio
9 bis, av. Frédéric estèbe
F-31200 Toulouse, Francio

Invito al Gonĉarov

La internacie konata Anatolo Gonĉarov post dekjara E-laboro revenis al Siberio. Li invitas siajn E-geamikojn veni somere por dematene fizike labori, detagmeze promeni sur belegaj montoj, devespere ĝui grandan E-bibliotekon kaj E-konversaciojn. Pri la detaloj skribu al: 659672 Altajskij Kraj, Soloneŝenskij rajon, selo Matveevka, Rusio.

Universitatoj! Reagu nun!

Jam dissendiĝis vaste en la mondon la enketilo pri universitat-nivela instruado. Tion subtenas ILEI, kiu urĝe alvokas ĉiun koncernaton resendi freŝajn informojn al s-ro Germain PIRLOT, Steenbakkerstr. 21, B-8400 Oostende, Belgio, ĝis plej laste la 15-a de aprilo. Kiu ne ricevis enketilon sed scias pri ia kurso, petu ekzempleron tuj!

Se vi volas uzi esperanton en via laborejo aŭ en via profesio, sendu viajn datumojn (Nomo, adreso, profesio, fako, eble ankaŭ nomon kaj adreson de la laborejo, pos-teno ktp.), por publikigi ĝin en la rubriko "Esperanto en laborejoj"!

Mallonge

Ŝanĝiĝis la adreso de Esperanto-Asocio de Brasilia. Jen la nova: Caixa Postal 3644, BR-70084 Brasilia, DF, Brazilio.

En 1992. okazos ekologia kongreso en Rio de Janeiro, al kio estas serĉataj verkoj kaj artikoloj en Esperanto. (Ankaŭ la tradukitaj estas bonvenaj). Se vi povas helpi, skribu al Asocio Esperantista en Rio de Janeiro, Rua Senador Dantas 117, sala 223, Brazilio.

Post tempoj de neaktivado, elektiĝis nova estraro de Argentina Scienca kaj Teknika Esperanto-Rondo (ASTER). La revigliĝon spronis vizito de d-ro Helmar FRANK, prezidanto de AIS.

La nova adreso de ASTER: Araoz 2754 P. 9 dep. D, RA-1425 Buenos Aires, Argentino.

"Fervoja Muzeo de Jugoslaviaj Fervojoj" Vi povas ricevi senpage la dulingvan, 12-paĝan eldonaĵon ĉe Zelenički Muzej, Nemanjina 6, YU-11000 Beograd.



Aperis kolora, dulingva faldfolio pri Tampere, havebla ĉe Urba Turisma Oficejo, Verkatehtaankatu 2, SF-33100 Tampere, Suomio-Finnlando.

Aperis la dua n-ro de dulingva interna inform-bulteno de Hungara Esperanto Junularo. Ĝi eldoniĝas porokaze, por HEJ-membroj senpage, redaktata de Csaba Németh, H-9400 Sopron, Várfal u. 2, Hungario.

La Esperanto-Muzeo en Jerusalemo posedas nun pli ol 800 librojn, plus milojn da revuoj, gazetoj. La muzeo estas vizitebla ĉiumarde, aŭ laŭ interkonsento kun d-ro Tala Laba, str. Arlozorov 10/21, Jerusalemo (tel: 02-663814 kaj 02-633058). La Jerusalema esperanto-grupo kunvenas ĉe Tala Laba dimanĉe je la 17-a horo.

Ĉarman infanan dancensemblon gastigu en via lando! La gvidanto de la ensemblo serĉas organizantojn de publikaj prezentoj. Sergeo Ĵilejkin, pk. 14127, 660025 Krasnojarsk, Rusio.



Korespondi deziras

30 gelernantoj (16-17 jaraĵ) de mezlernejo "50 Vjetori i Pavarësisë" kun samaĝuloj. Adreso de la instruisto: Bardhyl MEZINI, Rruga "Maliq Muço" Pall. 50. Ap. 3. Tirana, Albanio

Esperanto-Asocio Durrës, p/a Luan JAUOI, Rruga "A. Goga" Ap. 357/2, Durrës, Albanio.

Nehat SOKOLI, biologo 30-jara, Lagja 3, Pall. 4 Shkodra. 4. Kukës, Albanio.

Fervoja Koresponda Servo, s-ro Germano Gimelli, via Creti 61, I-40128 Bologna, Italio. Por korespond-deziroj sendu viajn nomon, adreson, aĝon, ktp., kaj la deziratajn temojn, kaj landon.

20 jara knabo Michel Chadailat, IMP. F-09600 Leran, Francio.

Bibliotekistino, 30 jara, deziras korespondi pri geografio, literaturo kaj turismo. Iwona Broniewska, ul Stalingradka 30, m. 112, PL-03468 Warszawa, Polio.

Tapani Lappalainen, Kivalakotukyla, SF-37500 Lempaala, Suomio-Finnlando.

19 jara irana knabino dez. kor. kun samaĝulinoj. Kolektas bildkartojn. Farzaneh Noruzi, Shahid Mokhtari Alley 9, Ghods, Shahzeid St. Bozorgmehr Ave, IR-81579 Estafan.

Diversaĝaj gelernantoj dez. kor. kun gelernantoj. Respondo estas garantiata. Leterojn sendu al la instruisto: Antanas Gvildys, Jurbarkas, Box 41, Litovio.

13-jara bulgara knabino, Nevema Hitova, ul. Kozloduj 6. ap. 11, BG-5000 Veliko Tarnovo.

Proksimaj limdatoj

27.03.-04.04. AIS provsesio, apud Prago,

1-a de aprilo, aliĝo al la UK, Vieno, venonta kategorio nur surloke,

11.04.12-04 Pápa, Hungario, Landa Deklamkonkurso, Org: József Németh, Kilián Itp. 75/9, H-8500 Pápa, Hungario, Tel: 36/89/24-896

13.04.-20.04 Bad Neuenahr-Ahrweiler, Germanio, Printempa Semajno Internacia, por la tuta familio, Org.: Wolfgang Bohr, Johannes-Kirschweg-Str. 11, D-5483 Bad Neuenahr, Germanio, Tel: 49/2641/4885

15.04.-21.04, La Salle (Aosta), Italio, 15-a Internacia Junulara Festivalo,

17-20 aprilo PASKO, Sandra van de Hoef, Spijkerpad 89, NL-7415 AT Deventer, Nederlando, Tel: (+31) 5700 30571,

17-20 aprilo, SAT-amikara kongreso, Simonne Bernard, 171, rue Raymond-Poincaré, F-33110 Le Bouscat, Francio,

24.04.-03.05 Berlina Arbara Renkontiĝo, por eksterlandanoj rabato 20-100(!)% depende de lando, Michael Peters, Steglitzer Damm 32, D-Berlin 41, Germanio, Tel: (+49-30) 7969740,

30.04.-05.05.92, Latvio Latvia Internacia Printempo (LIP-92),

30.04.-04.05.1992 Szombathely, Hungario, Junulara Esperanto-Renkonto, tutlanda junulara amuzado kaj jarkunveno de HEJ. Org.: Budai Tibor Adytér 3/a, H-9700 Szombathely, Hungario